

EI

Nelson MANDELA « Longa marŝado al libereco » lastaj paĝoj.

« Mi ne naskiĝis kun malsato al libereco. Mi naskiĝis libera... libera laŭ ĉiuj manieroj, kiujn mi povis koni. Mi estis libera kuri tra la kampoj proksime de la domo de mia patrino, libera naĝi en la pura rivereto, kiu trafluis mian vilaĝon, libera rosti maizon sub la steloplena ĉielo kaj libera rajdi sur la larĝa dorso de la malrapide paŝantaj bovoj. Dum kiam mi obeis mian patron kaj respektis la kutimojn de mia tribo, la leĝoj de homo aŭ Dio ne malkvietigis min.

Nur tiam, kiam mi eksciis, ke mia infanaĝa libereco estis nur iluzio, mi malkovris kiel juna viro, ke mi jam perdis mian liberecon, ĉar mi komencis malsati je ĝi. Komence, kiam mi estis studento, mi volis liberecon nur por mi mem; mi volis mallongdaŭran liberecon por resti ekstere dumnokte, por legi tion, kio plaĉis al mi, por iri al iu loko de mi elektita. Pli poste kiel juna viro en Johannesburg mi ekdeziris fundamentajn kaj honorajn liberecojn konkretigi miajn eblojn, gajni mian vivon, edziĝi, fondi familion... liberecon ne vivi kaptita en maljusta vivo.

Tiam mi pli kaj pli malkovris, ke ne nur mi ne estis libera, sed ke miaj gefratoj same ne estis liberaj. Mi konstatis, ke ne nur mia libereco estis reduktita, sed same tiu de ĉiuj, kiuj samaspektis kiel mi. Tiam mi aliĝis al Afrika Nacia Kongreso. Tiam mia malsato je persona libereco fariĝis pli granda malsato je libereco por mia popolo. Pro tiu deziro je libereco, por ke mia popolo povu vivi en digneco kaj memrespekto, juna timema viro fariĝis kuraĝulo, leĝrespekta advokato fariĝis krimulo, edzo amanta sian familion fariĝis senhejma homo, viro vivŝatanta devis vivi kiel monaĥo. Mi ne estis pli virta nek pli fordonema ol iu alia, sed mi malkovris, ke mi ne povis uzi la etajn limigitajn liberecojn, kiujn oni donis al mi, dum mi sciis, ke mia popolo ne estis libera. Libereco estas neerigebla: la katenoj portitaj de iu el miaj popolanoj estis portitaj de ĉiuj ; la katenojn portitajn de ĉiuj mi portis same.

Dum tiuj longaj solecaj jaroj la deziro je libereco por mia popolo fariĝis deziro je libereco por ĉiuj, Blankuloj kaj Nigruloj. Mi tute bone

sciis, ke perfortanto devas esti liberigita same kiel perfortito. Homo, kiu senigas iun alian homon je libereco, estas kaptita de sia malamo ; li staras malantaŭ bariloj el antaŭjuĝoj kaj mensmallarĝeco. Mi ne estas vere libera, se mi senigas iun homon je lia libereco, same kiel mi ne estas libera, se oni senigas min je mia libereco. Perfortanto kaj perfortito same dependas de sia homeco.

Kiam mi forlasis mian malliberejon, tia estis mia misio : liberigi perfortanton kaj perfortiton ambaŭ. Iuj asertas, ke la celo estas atingita. Sed mi scias, ke ne estas tiel. La vero estas, ke ni ne ankoraŭ estas liberaj ; ni nur atingis la liberecon esti liberaj, la rajton ne esti perfortitaj. Ni ne ankoraŭ faris la lastan paŝon de nia vojaĝo, ni faris nur la unuan paŝon laŭ pli longa kaj eĉ pli malfacila vojo. Ĉar esti libera ne konsistas nur je forĵeto de siaj katenoj ; temas pri vivo laŭ maniero, kiu respektas kaj plifortigas la liberecon de la aliaj homoj. La vera laboro celanta liberecon ĵus komenciĝis.

Mi sekvis tiun longan vojon al libereco. Mi klopodis ne heziti ; mi ofte faris mispaŝojn. Sed mi malkovris sekreton: post grimrado sur alta monteto oni malkovras, ke restas multaj aliaj atingendaj montetoj. Mi iom haltis por ripozi, por admiri la belegan pejzaĝon ĉirkaŭ mi, por rigardi malantaŭ mi la longan faritan vojon. Sed mi povas ripozi nur dum momenteto: kun mia libereco venas respondecokaj kaj mi ne rajtas ripozi pli longe, ĉar mi ne atingis la finon de mia longa marŝado“.

Nelson MANDELA

« Long walk to freedom / Un long chemin vers la liberté / Longa marŝado al libereco »

1994

El la angla kaj franca tradukis Mirejo Grosjean